

Junaj kaj maljunaj partoprenantoj

Joonatan Ojasild, Philippe Cousson, avo Endel Ojasild



Novaj kaj malnovaj esperantistoj

Šimon Pospíšil, Antal Pesti, Štěpán Pospíšil

Kongresanoj dum la ekskurso al Keszthely



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale:
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min	75
Apostoloj kaj iliaj atributoj	80
Kongresraporto, Révfülöp 2019	82
Protokolo de la jarkunveno	88
Recenzo - Spirita digesto	90
Lernantino de Samuel progresas en Esperanto	91
Vesperpreĝo - Mária László	92
Informetoj pri Evangeliaj tagoj	94
Invito al ordinado de Joel Amis	95
Ĉu lasos ni ĉe nia tablo	96

Redaktoraj vortoj

Finiĝis libertempoj kaj somerum-
ado. Ankaŭ la tempo de kongres-
umado jam pasis. Ni estas denove en
la “grizaj” ĉiutagaj cirkonstancoj.

Kiel bone, ke ni havas Dian Regnon,
ĉar en tiu ĉi numero de nia gazeto vi
trovas raporton de nia somera kongreso
en Hungario. Tiuj, kiuj partoprenis
povas iom rememori la belajn tagojn
kaj la bonan etoson, kvankam estis
grava kaj serioza temo.

Vi ankaŭ trovas la protokolon de la
tie okazinta jarkunveno. Krome restis
spaco en la gazeto, por ke kelkaj eroj,
el la kongresa programo, jam en tiu ĉiu
numero trovi lokon.

Sed ne nur pri kongresaĵoj vi povas
legi. Troviĝis spaco ankaŭ pri nova libro,
pri inform-budo dum la Evangeliaj tagoj
en Germanio kaj pri ordinado al sacer-
doto de nia membro Joel Amis. Sur la
dorsa paĝo vi trovas la kanton, kiu estis
nia ĉiu-taga “refreno” dum la kongreso.

Mi deziras al vi bonan legadon.

„... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.”

Enkonduka prelego dum la kristana kongreso en Révfülöp 2019

Philippe COUSSON, FR

Fremdulo, ekzilito, enmigrinto, tiuj vortoj plenigas niajn televidajn ĵurnalojn. Mi proponos al vi rigardon al nia temo per kalejdoskopo.

Mi trairos de la historio al nia nuna situacio, poste mi provos kompreni la ekziliton, la loĝanton, la akceptanton, analizi la sociologian fenomenon de la propeka kapro, rigardi la parolon kaj agadon de la eklezioj, esplori la ligojn inter kristanismo, kulturo kaj politiko, serĉi en la Biblio kion ĝi indikas al ni, kaj fine kio povas kaj devas esti nia engaĝiĝo kiel kristanoj.

Neniam estis tiom da fremduloj sur la Tero. Tio estas paradoksa diraĵo de la batalantoj por akcepto de rifuĝantoj. Ĝi indikas plurajn verojn, ke neniam tiom da homoj estis por diversaj kialoj devigitaj forlasi sian hejmon, kaj ke sur la Tero, ĉiu estas terano, do neniu estas fremda al la Tero. Multaj devas forlasi sian hejmon kaj samtempe ĉies hejmo estas la Tero.

Tamen, inverse, krom eble kelkaj grupoj en Afriko, necerte, ĉiuj homaj grupoj venas de alia loko ol la origino de la homaro. Ni ĉiuj estas posteuloj de migrintoj, en prahistorio, en Antikvaj tempoj, en Meza epoko aŭ en modernaj

periodoj ĝis nun. Eĉ la grupoj, kiujn en kelkaj landoj oni nomas “la unuaj nacioj”, iam venis el alia loko, eĉ povas esti ke ili ne estis la unuaj kie ili vivas nun.

Eĉ en Eŭropo, kiam oni volas identigi la “unuajn naciojn”, oni supozas la vaskojn aŭ la sameojn, sed eĉ tiuj venis post aliaj. En la keltaj regionoj oni parolas pri la antaŭ-keltoj, kiuj ne estas la pra-keltoj. La prakeltoj vivis en la centro de Eŭropo kaj estis devigitaj moviĝi kaj alvenis en la regionon de la konstruintoj de la ŝtonaj monumentoj.



Philippe Cousson

Pluraj nacioj konstruiĝis vole nevole per tiu alveno de homoj. Skize estas du sintenoj: la t.n. “melting pot” (mikspoto), apudmetado de diversaj komunumoj, ekzemple Usono, aŭ la integriĝo al, laŭ ebla vidpunkto, filozofia nacio, ekz. Francio.

Pri tiuj migrantoj estas dirataj tiom da malveroj

Kio estas ekzilito? Estas tiu, kiu pro plej diversaj kialoj devas forlasi sian hejmon, familion, kulturalan medion. Kompreneble la situacioj tre varias. La kaŭzoj tre varias. Oni povas resume diri ke temas pri malespero kaj espero. Malesperiga estis ties situacio kaj la espero situas aliloke. Ne plu eblas vivi pro vivminacoj, pro morto aŭ murdo de proksimuloj, pro persekutoj religiaj aŭ etnaj aŭ aliaj. Pro neeblo vivteni simple. La nura solvo vidata estas foriri al loko kiu aspektas pli promesplena, kie eblos simple vivi.


Pri tiuj migrantoj estas dirataj tiom da malveroj. Ne estas amaso da rifuĝantoj alvenantaj en Eŭropo. Estas ridinda proporcio de ĉiuj rifuĝantoj en la

mondo. Fermi la landlimojn ne malhelpas la alvenon, sed faras ĝin pli danĝera kaj kosta.

Dumvoje, la ekzilito renkontas diversajn homojn. Inter ili estas tiuj kiuj profitas la okazon utiligi ilin por laboro kvazaŭ sklava, por seksa ekspluatado, aŭ por akiri el ili monon por kontra-bande pasigi al ili landlimon aŭ maron, aŭ oni simple mortigas ilin por la malmulta havaĵo. Sed inter ili estas ankaŭ tiuj, kiuj helpas al ili manĝi, loĝi, plui, kiuj permesas al ili esti homo, vaganta homo sed homo.

Ili ankaŭ renkontas aliajn homojn kiuj ne havas principe malbonan intencon, sed kiuj timas. Tiuj timas, ĉar ili mem ne vivas en certigaj cirkonstancoj, kaj vidas en tiuj alvenantoj minacon; minacon ekonomian, politikan, sekurecan, kulturalan, eĉ religian.

Ili vidas minacon en sia memo, en sia identeco. Sed, kiam oni parolas pri identeco, oni parolas pri la difino de si mem. Kaj aperas tiam politikistoj kiuj uzas tiujn timojn por venki. Tiuj ĉi antaŭenmetas supozatan ekonomian minacon, supozatan sekurecan minacon, supozatan kulturalan minacon, sed ĉiuj ĉi tiuj minacoj estas mensogaj.



Laŭ statistiko de UNHCR, la Alta Komisiito de la Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj, troviĝas entute 70,8 milionoj da homoj, kiuj perforte estas forpelitaj de siaj hejmoj, el tiuj 41,3 en siaj hejmlandoj kaj 25,9 sub la mandato de UNHCR. 3,5 milionoj estas azil-petantoj. Ĉirkaŭ 80 % restas en lando proksima al sia hejmlando. La lando, en kiu plej multaj rifuĝantoj troviĝas, estas Turkio. La plej nova grupo da azilpetantoj venas el Venezuelo. (<https://www.unhcr.org/figures-at-a-glance.html>)

Kiam estas ene de socio grava krizo, ekonomia, sekureca aŭ senca, ekestas reago, kiun sociologoj kaj filozofoj nomis per biblia bildo: la propeka virkapro (Levidoj 16).

Laŭ kion mi komprenis el la pensado de René Girard, ĉiu homo kaj ĉiu homgrupo funkcias laŭ la mimetisma deziro, t.e. envii, deziri tion, kion la alia posedas aŭ deziras posedi aŭ povus deziri posedi. La samo validas inverse, kaj tio kondukas al rivaleco kaj fine al perforto. Tiu perforto minacas la koheron de la socio mem. La socio, la grupo, trovas solvon en la formo de tio kion oni nomas “propeka virkapro”. Tiu estas viktimo de la kolektivo, ekstera de ĝi, kiu kvankam senkulpa pri la problemo, estas akuzata esti la kaŭzo de ĉiuj problemoj kaj malfacilaĵoj. La ofero, la morto de tiu viktimo kvietigas la konflikton. Ĝis venos la sekvonta konflikto. Tiu skemo estas trovebla en ĉiuj civilizoj, ankaŭ en la bibliaj rakontoj, sed en ĝi estas agnoskata la senkulpeco de la viktimo kontraŭe al la aliaj mitoj.

Tia situacio troveblas en la situacioj de rasismo kaj naciismo. La respondeculo de niaj malfacilaĵoj, de niaj mankoj, estas la fremduloj, la malsamuloj, kvankam tio kompreneble ne veras. Sed ili nepre estas la kulpuloj, kiuj ni ne estas. Kaj ili devas esti punataj pro tio. Ni studis en la lernejo pri la naziismo kaj la genocido de la Judoj. Kaj nune estas kelkaj kiuj mortigas ĉu judojn, ĉu islamanojn, ĉu nigrulojn, ĉu hispanamerikanojn.

Inter la akuzoj kontraŭ la fremduloj estas, ke inter ili troviĝas pli da krimoj.

Tio statistike ne veras. Estas samproporcie krimuloj inter la lokanoj kaj inter la fremduloj. Tio estas facila akuzo, montriĝante al unu kazo por akuzi ĉiujn.

Estas ankaŭ akuzo kontraŭ la fremduloj, foje eĉ en kadro de supozata komploto, nome la “granda anstataŭigo” – imago, kiu havas neniun realon, kion pravas la statistikistoj.

Alia imago, ŝatata de la akuzantoj, estas la “kolizio de civilizoj”, analizo de la postkomunisma monda situacio sen prognoza valideco.

Tiuj opinioj kontraŭ la fremduloj ĝenerale kaj la ekzilitoj pli precize, feliĉe ne estas dividata de ĉiuj. Ekzistas multaj homoj kaj organizaĵoj, kiuj helpas al ekzilitoj kaj fremduloj. Tion ili faras pro diversaj kialoj. Ĉar ili sentas sin homo, kiu devas helpi al homo. Ĉar sciante sin amata de Dio ili amas la proksimulon. Ĉar tiu kiu pereas devas esti savata, kiu ajn tiu estas. Tiaj homoj helpas en administraj formalizaĵoj, en jura protekto, en loĝado kaj nutrado, en medicina helpo, kaj ankaŭ en savado el droniĝo en la maro.

Inter tiuj grupoj kaj homoj troviĝas eklezioj kaj kristanoj. Jam en 1989, la ekumena kunveno en Bazelo diris¹:

§84, l) Ni petas la ekleziojn rekonii, ke **rifuĝintoj kaj gastlaboristoj** forlasas sian hejmlandon en kaj ekster Eŭropo aŭ pro tio ke ilia ekonomia situacio estas senespera, aŭ ĉar ili estas viktimoj de politika, socia aŭ religia subpremo. Ni postulas la forigon de ĉiuj restriktioj kontraŭ tiuj homoj. Ni

¹ Paco kun justeco : fina dokumento de la Eŭropa Ekumena Kunveno en Bazelo 15.-21.05.1989, p. 29

alvokas ĉiujn eŭropajn kristanojn, ke ili akceptu ilin kiel fratojn kaj fratinojn kaj laboru por ŝanĝi la leĝojn kaj la publikan opinion kaj konduton por permesi plibonigon de ilia situacio.

Krome ni volas atentigi pri la milionoj da **rifuĝintoj kaj forpelitoj** en aliaj kontinentoj. Ili estas viktimoj de ekonomiaj, politikaj, sociaj, mediaj ŝanĝoj kaj perfortaj situacioj. La eŭropaj eklezioj kaj kristanoj devus fari ĉion kion ili povas por elimini la profundajn kaŭzojn de ilia mizero kaj por doni tujan helpon.

Mi bone konas la francan situacion. Mi mencias la “Cimade”. Ĝi originas en la dua mondmilito. Ĉe la komenco, multaj homoj estis evakuitaj el la landlimaj regionoj. Fondiĝis komence protestanta komitato por helpi al ili. Dum la okupacio, ĝi zorgis pri la diversaj kaptitoj, politikaj, judaj kaj aliaj, eĉ partoprenis en kaŝvojoj por fuĝado al sekuraj landoj. Post la milito ili ankaŭ zorgis pri la viktimoj de la milito, ankaŭ pri kaptitaj germanaj soldatoj. Poste, ili zorgis pri la diversaj enmigrintoj, el Nordafriko, el Sudorienta Azio, el Eŭropo, el Sudsahara Afriko kaj nun el Mezoriento, inter aliaj multaj grupoj.

Pluraj kristanaj organizaĵoj kontraktis kun la franca ŝtato pri akcepto de ekzilitoj, ĉefe familioj troviĝantaj en rifuĝejoj en Jordanio, Libano aŭ Turkio, el Sirio aŭ Irako, laŭ leĝaj vojoj. Tio nomiĝas la “homaraj koridoroj”.

Modeste, mia eklezia paroĥo provizas salonon por lecionoj de franca lingvo, matematiko, ktp. por junuloj, ĉefe el Afriko, kies plenaĝuleco restas pruvenda.

Franca politikisto diris frazon, kiun oni ofte nur parte citas: *Francio ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo*, kaj la forgesata sekvo estas *sed ĝi devas fidele preni sian parton*.

Kion mi citis el Francio ekzistas ankaŭ aliloke. Vi certe konas ekzemplojn.

Delonge estas debatoj en la eklezioj pri la rilatoj inter kristanismo kaj politiko, inter la eklezioj kaj la ŝtatoj. La opinioj de la Reformatoroj kaj de la posteuloj ne ĉiam similis. Luther parolis pri la “du regnoj”. Ĉu la kristanoj, ĉu la eklezioj devas involviĝi en la ŝtataj kaj politikaj aferoj? Ĉu la ŝtato devas interveni en la ekleziaj aferoj? Tamen restas kelkaj principoj. La amo al la proksimulo restas petata de la kredanto. La obeo al la leĝo de Dio superas la obeon al la leĝo de la ŝtato. La plenumo de la alvoko por justeco superas la submetiĝon al la homaj instancojn.

Estas daŭre debatoj pri la rilatoj inter kristanismo kaj kulturo. Kiamaniere kristanismo influu la ĝeneralan kulturon? Kiamaniere ĝi rezistu reciproke? Kiamaniere distingi la kristanecan kulturon, foje ne plu kristanan, disde la veraj kristanaj elementoj? Respondi tiujn demandojn povas eviti la pretendon de kelkaj politikistoj diri la kristanan parolon.

Ni do rigardu al nia fonto, al la Biblio. Kaj tuj venas rememoroj pri tekstoj kiuj defendas la fremdulon.

En la Torao, Readmono 10:19 : *Amu do la fremdulon, ĉar fremduloj vi estis en la lando Egipta*.

Kaj estas paralelaj en la aliaj libroj de Pentateŭko.

La moto de nia kongreso „... *mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.*” en la parabolo pri ŝafoj kaj kaproj indikas la samon.

Kelkaj volas konstrui murojn por disigi – ni partoprenu en la konstruo de pontoj por kunigi la homojn, por atesti pri la donacoj de Dio, kiujn ni ricevas por disdoni.

Dum la semajno vi havos la okazon viziti diversajn bibliajn pecojn por pripensi ilin. Oni devas tamen scii, ke la kunmetado de la Biblio daŭris plurajn jarcentojn kaj ke en kelkaj periodoj estis grava la sankteco de la popolo, aŭ plu ĝuste de la pastraro. Tiam oni insistis pri la disigo de la popolo de Dio disde la aliaj paganoj. Sed eĉ la ekziston de tiuj tekstoj indikas ke la fremduloj estis bone akceptataj.

Restas tamen tiu diro, ke Abraham venis el Ur, kaj estis migranta fremdulo en Kanaano. La popolo estis ekonomiaj ekzilitoj en Egiptio. Pro tio la ordo zorgi pri la fremdulo tre gravas.

Krome, en la Nova Testamento, oni asertas plurfoje ke la kredanto estas fremdulo sur ĉi tiu Tero. 1 Petro 2:11: *fremduloj kaj migrantoj... antaŭ la nacioj.*

La batalo por nacioj ne estas la nia. Tiu por justeco kaj vero, jes. Kun la armiloj de la fido.

En la dua numero ĉijara de Dia Regno, Gerrit Berveling tradukis parton de la prakristana teksto “La paŝtisto de Hermas”, kaj la unua parabolo titolas “La vera civito de la kristano”. Estas interese legi ĝin rilate nian temon.

Ĉar Vi scias, ke vi sklavo de Dio loĝas en fremda lando, ĉar via civito estas longe for de ĉi tiu civito.

En kio do la kristanoj engaĝiĝu? En la amon al la fremdulo, certe. En la akcepton de la ekzilito, certe, laŭ la eblecoj. En la supozatan defendon de nacia kulturo aŭ civilizo kontraŭ aliaj kunhomoj, certe ne.

Kelkaj volas konstrui murojn por disigi — ni partoprenu en la konstruo de pontoj por kunigi la homojn, por atesti pri la donacoj de Dio, kiujn ni ricevas por disdoni.



La **Monda Tago de Rifuĝintoj** estas ĉiujara internacia festo celebrata la 20an de junio. Ĝi rememorigas la kuraĝon kaj forton de la rifuĝintoj en la tuta mondo. En pli ol cent landoj okazas solenaĵoj. Organizataj estas kulturaj eventoj kaj instruado, kiel ankaŭ konferencoj, programoj por familioj kaj infanoj, celantaj komprenigi la bezonojn de la rifuĝintoj en la tuta mondo.

La duan tagon post celebrado de Epifanio en la Romkatolika Eklezio estas festata la Monda Tago de la Migrantoj kaj Rifuĝintoj. En instrukcio de Papa Konsilio pri Animzorgado de Migrantoj kaj Vojaĝantoj (1978), kiu instigas al regula festado de la Migranto-Tago, estas skribite: *Ĝi estas pripensita kiel ĝusta okazo por vigligo de kristanaj komunumoj pri respondeco koncerne la fratojn migrantojn kaj por devo de kunlaboro pri solvado de iliaj diversaj problemoj.* (El Vikipedio)

Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

kvara parto

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Bartolomeo

La nova testamento preskaŭ nenion diras pri li, la tradicio tenas lin kiel diabloforpelanton.

Johano nomas lin Natanaelo kaj skribas pri li en 1,47: *Jesuo vidis Natanaelon venanta al li, kaj diris pri li: Jen vera Izraelido, en kiu ne estas ruzeco!*

Li estis tiu, kiun Jesuo antaŭe vidis sub la figarbo.

La apokrifoj raportas, ke Bartolomeo disvastigis la evangelion en Italion kaj Armenion. En Armenio li mortis tiel, ke oni senhaŭtigis lin (forigis lian haŭton) kaj fortondis la kapon – pro tio estas lia atributo la tranĉilo.

La relikvojn de Bartolomeo oni portis al Romo, kie sur la insulo de Tibero oni konstruis preĝejon al lia honoro. Antaŭe sur tiu ĉi insulo estis la templo de Asklepios, kiu estis la dio de la kuracado. En la kristana Romo

Parto de la altara pentraĵo en la preĝejo de Sankta Aŭgusteno, Birmingham Museum of Art



La martirigado de Sankta Bartolomeo, Pentraĵo de Giovanni Battista Tiepolo (1696-1770)



Bartolomeo fariĝis la patrono de la kuracado.

Mikelanĝelo sur la flanka muro de la Siksta-kapelo tiel prezentas lin, ke en unu de liaj manoj estas tranĉilo, kaj en la alia mano estas lia propra haŭto.

Mikelanĝelo, sur la flanka muro de la Siksta-kapelo



Tomaso

Oni plej multe kiel „nekredeman” konas Tomason, ĉar estis li, kiu estis „nekredema” pri la reviviĝo de Jesuo kaj postulis ekzameni la vundojn de Jesuo kaj meti siajn fingrojn en liajn vundojn.

Plejparte ni konas lian vivon el la apokrifaj evangelioj. Laŭ tiuj, li ankaŭ dubis pri la korpa ĉieliro de Maria. Maria aperis al li kaj transdonis al li zonan kiel pruvon.

Laŭ la apokrifa literaturo post Pentekosto aperis al li Jesuo kaj sendis lin al Barato/Hindio. Dum lia misio, li devis konstrui la palacon de la hinda reĝo, krome li multe predikis kaj faris multegajn miraklojn.

Li finis sian vivon tiel, ke la ĉef-pastoro de la reĝo mortpikis lin.

La konvertitoj entombigis lian korpon. Laŭ la legendo lia tombo estas sur monto, kiun ĉirkaŭas la akvo de la



Caravaggio, 1571-1610,
en Sanssouci, Potsdam

Paradizo. Sur la monto estas preĝejo kaj sur la altaro estas arĝenta ŝranko. Antaŭe ĉiam lumiganta lampo gardas lian memoron, kaj la korpo de Tomaso estas en la arĝenta ŝranko.

Aliaj fontoj diras, ke, ĉirkaŭ la jaro 230, lian korpon oni kunportis al Edessa (Sirio) kaj tie entombigis ĝin.

Lia atributo estas mezurlato ĉar li konstruis multajn preĝejojn dum sia misia laboro.



Daŭrigota



En preĝejo en la vilaĝo Habo en suda Svedio, ĉirkaŭ 1723



Baziliko de Sankta Johano en Laterano
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

Raporto pri la kongreso de KELI en Hungario, Révfülöp, inter 10 – 17 de aŭgusto 2019

Teksto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Fotoj: Václav Pospíšil, CZ

Ĉi-jare ni estis invitataj kongresi en Hungario, en Révfülöp, kiu situas je la norda bordo de la granda hungara lago, Balatono.

Nia kongresejo estis la moderna eduka centro de la luterana eklezio. Komfortaj 2-3 litaj ĉambroj atendis nin kaj bone ekipita salono kun projekciilo kaj piano, kie ni povis kaj aŭskulti prelegojn kaj fari preĝojn. Inter la du aloj de la U-forma konstruaĵo estis bela ĝardeno kun grandaj arboj kaj en iliaj ombroj troviĝis komfortaj seĝoj kaj litoj. Tuj apud la ĝardeno estas la preĝejo de la lokaj luteranoj, kiun ni rajtis uzi dum nia sankta manĝa Diservo.

Ni sekvis la kutiman kongresan horaron: matene ni komencis per maten-

preĝo, poste matenmanĝo, kiun sekvis prelego(j). Post la tagmanĝo denove prelego(j) aŭ alia programo. Kiel novaĵo, post la verspermanĝoj ni faris Bibliajn rondojn, kiun sekvis alia programero. Ni fermis la tagon per vesperpreĝo.

Ni estas tre dankemaj al Norbert Südland (DE) kaj Agneta Järström (SE), kiuj per piano kaj violono afable akompanis niajn preĝojn kaj Diservojn dum la tuta semajno!

SABATE

Post longa-mallonga vojaĝo, laŭ la plano, la plejmulto de la kongresanoj en ordo alvenis. Estis kelkaj, kiuj alvenis nur dimanĉe kaj ankaŭ estis kelkaj, kiuj nur dum kelkaj tagoj povis esti inter ni.



Agneta Järström kaj Norbert Südland antaŭ la piano.



Philippe Cousson

Post la vespermanĝo ni fermis la tagon per vesperpreĝo, kiun mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU) gvidis.

DIMANĈE

Post la matenmanĝo ni havis Diservon en la salono, kaj ĝin gvidis Philippe Cousson (FR).

Posttagmeze nia prezidanto (Philippe Cousson) faris sian enkondukan prelegon, kiun vi povos legi en tiu ĉi numero de Dia Regno. Post tiu prelego, Ágnes Ráczkevy-Eötvös faris sian prelegon kun la titolo „Ĉu vi gastigos min?” pri la 30-jara historio de la hungara fuĝint-helpa agado. Tiu ĉi historio komenciĝis heroe en 1989, kiam Hungario aliĝis al la Konvencioj de Ĝenevo; ke ni povu helpi al la plurdek-mil homoj, kiuj eskapis el la diktaturo de Nicolae Ceaușescu, kaj ke Hungario ne devu resendi la rifuĝintojn laŭ sekreta pakto al Rumanio. Finiĝis la historio hontinde en la lastaj jaroj, kiam Hungario konstruis barilon kontraŭ fuĝintoj. Ĉijare, la 20an de junio, kiam

estas la Monda Tago de Rifuĝintoj (memore al la subskribo de la Ĝeneva Konvencio), la Alta Komisaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj en Hungario ne povis organizi feston, ĉar eĉ ne unu organizaĵo kuraĝis permesi enveni UN kaj organizi memorfeston.

Post la vespermanĝo ni havis la unuan Biblian rondon. Tiujn rondojn gvidis Philippe Cousson, kiu antaŭe donis la tagajn versiklojn, do ni povis jam antaŭe legi ilin. Dimanĉe la temo estis Genezo 23 (Abraham aĉetas kampon por tombejo) kaj Mateo 15,21–28 (La kanaanino).

Post la interesa kaj enhavriĉa interparolo, okazis la interkona vespero. Kun mia filo (André Áradsson HU/SE) mi (Ágnes Ráczkevy-Eötvös) faris demandojn nekutimajn, per kiuj ni povis pli bone ekkoni unu la alian, ekzemple: Kiu inter ni loĝas en sia naskiĝurbo, aŭ ne loĝas en sia naskiĝlando? Kiu inter ni estis sude de la ekvatoro, aŭ estis jam pli alte ol dumil metrojn? Kiu inter ni sidis jam sur kamelo aŭ karesis jam



Václav Pospíšil



La reprezentanto de la Helsinki Komitato en Hungario prelegas

delfinon? Kompreneble al la „jes”-respondoj apartenis ankaŭ interesaj historioj!

La tagon ni fermis per vesperpreĝo, kiun ĉifoj gvidis Václav Pospíšil (CZ).

LUNDE

Post la matenpreĝo, kiun gvidis Bengt Olof Åradsson (SE) ni matenmanĝis.

Al tiu ĉi tago estis invitata la reprezentanto de la Hungara Helsinki Komitato, András Léderer, kiu prezentis al ni la laboron de ilia organizaĵo. Tiu ĉi civila organizaĵo estas unu el la tre malmultaj, kiuj kontraŭ la decidoj, eĉ leĝoj de la hungara registaro, faras tion, kion ilia konscienco diras, kaj helpas al homoj, kiuj bezonas ian helpon.

Post la tagmanĝo ni havis inter-



Šimon Pospíšil, Ágnes Ráczkevy-Eötvös kaj André Åradsson vojaĝas malnovstile

parolon kun nia gasto. Li respondis al niaj demandoj kaj ankaŭ ni rakontis, kion ni spertis en niaj landoj rilate al la fuĝintoj, kiuj venis el aliaj landoj.

Post la vespermanĝo ni havis Biblian rondon. Ĉifoj nia temo estis Luko 10,25–37 (La bona Samariano) kaj Jesaja 56,1–8 (Mia domo, preĝ-domo por ĉiuj popoloj). Poste Pavel Polnický kunportis nin, per la helpo de bildoj, al Mekziko.

La tagon ni fermis per la kortuŝa vespera preĝo de Maria László (HU).

MARDE

Post la matenpreĝo (Ágnes Ráczkevy-Eötvös) kaj matenmanĝo okazis nia tuttaga ekskurso. Per buso ni iris al Keszthely por viziti la kastelon de la Festetics-familio. Nia ĉiĉerono gvidis nin tra la kastelo kaj rakontis al ni pri la historio de tiu ĉi elstara nobela familio, kaj pri la konstruado kaj ekipaĵoj de la kastelo. Post la vizito ni



Petr Chrdle prezentas librojn

havis bonan tagmanĝon en proksima restoracio. Post la manĝo ni havis liberan tempon kaj povis viziti kelkajn el la interesaj ekspozicioj en la ĉirkaŭaĵo. Eble la plej multaj de ni interesiĝis pri la maniero, per kiu niaj antaŭuloj vojaĝis antaŭ cent jaroj, aŭ promenis en la belega ĝardeno de la kastelo kaj vidis la birdan parkon kaj la palmodomon.

Post la hejmenalveno kaj vespermanĝo okazis, kiel kutime, la Biblia rondo, kies temoj estis: Readmono 10,19, 26,5; Eliro 22,20, 12,49; Levidoj 19,34, 24,22; Nombroj 15,16; Jeremia 22,3; Malahi 3,5; Koloseanoj 3,11.

Poste Petr Chrdle (CZ) prezentis al ni la novajn librojn kiujn li eldonis, kaj ni finis la tagon per la vesperpreĝo de Marija Beloševič (HR), kiu al nia granda ĝojo venis al nia kongreso dum kelkaj tagoj kaj por saluti nin en la nomo de IKUE.



Norbert Südland prelegas

MERKREDE

Antaŭ la matenmanĝo en tiu ĉi tago la matenpreĝon gvidis Philippe Cousson.

Poste Norbert Südland faris prelegon kun la titolo „La alĝebra matematiko de Izmael”. Malgraŭ la „ektimiga” titolo estis tre interesa la prelego kiun sekvis vigla scienca interparolo kun multaj ridoj kaj ŝercoj.

Post mallonga paŭzo ni aŭskultis alian interesan prelegon, kiun faris Bengt Olof Åradsson (SE), pri “Falsaj novaĵoj (angle Fake news)”, ke ni devas esti singardaj kaj kritikemaj pri tio, kion ni legas, ne tuj dissendi dubindan informon kaj kiel ni provu defendi nin kontraŭ ili.

Post la tagmanĝo ni havis iom da libera tempo, kaj antaŭ la vespermanĝo ni aŭskultis Samuel Gaillard (FR) kiu rakontis pri tio, ke ilia eklezia komunumo akceptas kaj helpas iranajn kristanojn trovi novan hejmon en Francio.

Post la Biblia rondo, kies temo ĉi-vespere estis la libro de Jona, ni aŭskultis popolmuzikan koncerton. El la najbara vilaĝo alvenis la muzikistoj, tri gefratoj: la fratino estis la „ĉefo” per violono. La fratoj, per aldviolono kaj kontrabaso, estis la akompanantoj. Ili vere virtuoze ludis la tradiciajn hungarajn melodiojn el diversaj regionoj.

Ni finis la tagon per vesperpreĝo, kiun Bengt Olof Åradsson gvidis.

ĴAŬDE

Post la matenpreĝo, kiun gvidis Norbert Südland, kaj post matenmanĝo, okazis la kutima ĵaŭda programo – la Jarkunveno. La protokolon vi povas legi en Dia Regno (ĉi-numere).



Katalin Popoviciu pianludas dum la adiaŭa vespero

Posttagmeze ni havis Diservon kun Sankta Manĝo, kiun ni celebris en la preĝejo, kiun ni per la afabla permeso de la loka pastoro rajtis uzi. La predikon de Philippe Cousson vi povos legi en estonta numero de nia gazeto.

Vespere ni post la Biblia rondo (Efesanoj 2,11–22, Vi ne plu estas fremduloj) denove vojaĝis kun Pavel Polnický, ĉifoje al Tajlando, Malajzio kaj Singapuro.

La vesperpreĝon gvidis Samuel Gaillard.

VENDREDE

La tago komenciĝis per matenpreĝo de Bengt Olof Åradsson kaj per matenmanĝo. Poste ni iris per buso al Tapolca, kie estas granda groto – kun lago! Unue, per gvidado de ĉiĉerono, ni vidis la ekspozicion pri la groto. Poste tiu, kiu

havis forton kaj kuraĝon, suben- kaj supreniris 73 ŝtupojn, iris al la groto kaj duope sidigis nin en boatojn. Ni bezonis ĉirkaŭ dudek minutojn por ĉirkaŭiri la lagon. Pro la varmega akva fonto ne estis malvarme kaj la lumo de la lampoj montris la belegajn rokojn ankaŭ sub la purega akvo.

Posttagmeze ni vizitis lokan ekspozicion pri la vinkultivado de la regiono, kaj poste per la titolo de “Tom da lingvaĵo” Bengt Olof Åradsson helpis al ni ekkoni lingvaĵojn, kiujn ni malofte aŭ ne tute korekte uzas.

Vespere ni dum la Biblia rondo „kolektis la panerojn”, do priparolis tion, kion ni ricevis dum tiuj interparoloj, kaj kion ni povas kunporti hejmen por plia pensado.

La kutima fermo de la lasta tago estis kompreneble la Distra Vespero, kaj kiel kutime, la kongresanoj estis tre aktivaj kaj ni aŭskultis muzik-pecojn, poemojn, ŝercojn kaj provis solvi enigmojn.

Ni fermis la tagon per adiaŭa vespera preĝo, kiun la organizanto de la ĉijara kongreso, Ágnes Ráczkevy-Eötvös gvidis.

SABATE

Post la matenmanĝo, per mallonga matenpreĝo, ni fermis la ĉi-jaran kongreson kaj adiaŭis unu la alian.

Ĝis la revido en 2020, verŝajne en Pollando, en Legnica! (La detalojn kaj la aliĝilon vi trovos baldaŭ en Dia Regno)

☪



Mirosława Kubicka kaj Agneta Järllström (Foto de Agneta Järllström)



Sieglinde Stamm kaj Pavel Polnický
Malantaŭe Antal Farkas, geedzjoi Gaál



Margit-Judit Olah, Katalin Popoviciu, Terézia Ildikó Scurt

Ripoze kaj atendante

Margareta Andersson, Teresa Pomorska, Antal Pesti



Pavel Polnický, Teresa Pomorska, Petr Chrdle

Jarkunveno de KELI – PROTOKOLO

Révfülöp 15. 8. 2019

Partoprenis 16 membroj kaj 1 gasto (listo de partoprenintoj ĉe la sekretario).

1. Jarkunvenon malfermis prezidanto Philippe Cousson.
2. Elekto de kunprotokolantoj – akceptitaj Agneta Järnlström kaj Sieglinde Stamm
3. Aprobo de la programo publikigita en Dia Regno
4. Komunikoj: Estis transdonitaj salutoj de A. Kronenberger, S. Krüger, E. v. Dijk, V. Tuinder, E. Borsboom, W. v. Ganswijk, B. Rehm, K. H. Schaeffer, I. Bagi, P. Klimeš, T. Polnický kaj G. Stier.
5. Funebra memorigo: Dum la jaro mortis fratinoj Eva Farkas-Tatar (HU), Maria Hansen (SE), Thea Retzlaff (DE), Zsuzsa Darvas (HU), Radka Křivánková (CZ), edzinoj de S. Krüger kaj G. Hofmann (DE). Ni memoris ankaŭ la prezidanton de IKUE, G. Daminelli.
6. Sekretaria raporto. Pavel Polnický daŭre kontrollegas gazeton Dia Regno, prizorgas ĝian presadon kaj dissendon al abonantoj. Multajn personojn, kiuj ricevas senpage DR li kontaktas kun peto skribi pri uzo



De maldekstre: Václav Pospíšil, Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Samuel Gaillard, Philippe Cousson, Bengt Olof Åradsson, Pavel Polnický.

- de DR. Se ne venas reago, ni ĉesas sendadon. Plej ofta estas reta komunikado, venas petoj pri informoj, DR kaj libroj precipe el Afriko. Ne ĉiam sendaĵoj atingos adresatojn!! Mankas novaj membroj de KELI. Malnovajn DR li sendas al diversaj E-aranĝoj, ĉi-jare disdonis persone 100 ekz. en Litovio (BET) kaj sendis 100 ekz. al UK en Lahtio.
7. Kasistan raporton klarigis Agnes Raczkevy-Etvös kaj respondis demandojn.
 8. Raporton de kaskontrolantoj legis Norbert Südland. Ili trovis kontadon en la ordo kaj esprimas nian dankemon al kasistino.
 9. Ĉiuj raportoj estis aprobitaj
 10. Pritrakto de la buĝetoj kaj iliaj akcepto.
 11. Pri nia gazeto Dia Regno parolis redaktoro B. O. Áradsson. Li petas membrojn, ke ili pli multe skribu kaj sendu al li artikolojn kaj informojn pri niaj aktivecoj (kun fotoj) kaj aldonu fonton aŭ permeson de la aŭtoro! Kontrolas lingve A. Kronenberger, tehniko P. Polnický.
 12. Estrarelektoj – ĉi jare finas ofic-periodo de P. Cousson kaj S. Gaillard. Ili estis reelektitaj.
 13. Kongreso venontjare povus esti en pola urbo Legnica, proksime de Vroclavo. Ne estas klara, ĉu IKUE organizos propran kongreson, se ne, povus okazi ekumena kongreso. Alie estos Kristana kongreso, kiun povus partopreni ikueanoj kaj nemembroj. Kongreson organizos Tereza Pomorská, kiu poste informos nin (helpos Pavel Polnický).
 14. Diskuto kaj proponoj. Agnes demandis, ĉu ni ne organizu kongreson nur post 2 jaroj. Estis decidite kongresi ĉiujare (se ni kapablos fari tion).
 15. Philippe Cousson fermis la jar-kunvenon.
- Kompilis P. Polnický laŭ kun-protokolantoj Agneta Järllström kaj Sieglinde Stamm.

Sankta Luko 14

13 Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; 14 kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. 15 Kaj aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio.

Spirita Digesto: Kolekto de Bibliaj verskiloj kun respondaj diroj por ĉiu tago de la jaro – 1a kolekto

Kompilita de Adebayo Ola Afolaranmi

el la antaŭparolo de Philippe COUSSON, FR

Ĉiutaga legado kaj meditado de la Biblio estas la nutraĵo, la spiro, kaj la lumo de la vivo de ĉiu kristano kaj ankaŭ de ĉiu kristana esperantisto. Supozeble, tiu ĉi legas, studas, meditas kaj ankaŭ preĝas en la gepatra lingvo. Sed, kial ne preni alian tempon por tion fari ankaŭ en Esperanto.

Dum la diversaj kristanaj renkontiĝoj esperantistaj, la lingvo uzata estas ja Esperanto. Tion pruvas la ekzisto de la Biblia teksto en Esperanto ekde 1926, kaj ankaŭ de diversaj himnaroj. La lingvo internacia estas ankaŭ uzata en multaj diservoj kaj preĝtempoj. Tion pruvas la ekzisto de *Adoru* (2001), tiu ekumena preĝ- kaj kantlibro, kiu ankaŭ proponas tekstojn por matenaj aŭ vesperaj preĝtempoj.


Por personaj spiritaj momentoj, sole kun Dio, ekzistas jam kelkaj iloj. Mi mencias plurajn:

La broŝuro *Biblia Studplano por Helpo dum la Kvieta Tempeto antaŭ Dio* aperinta en 1937 kaj reeldonita en 1971 de Esperanto-Misio, provizas pro ĝia malgrandeco nur referencojn por legi kaj mediti.

En 1969 aperis la unua eldono de *Preĝo por Ĉiu Tago* de Jelly Koopmans, ĉiutagaj preĝetoj por preĝi kaj primediti dum la tuta jaro, kiuj respegulas la dediĉon de la aŭtorino al la fido kaj al la praktika kristana amo.

En 1996 aperis la kompilo de Jerald Veit, *365 Tagoj el la Biblio*. En 43 paĝoj, ĝi proponas por ĉiu tago ne nur referencon sed la tekston de versiklo, iom laŭ la maniero de la Moravaj fratoj.

Adebayo Ola Afolaranmi, niĝeria pastoro kaj esperantisto, tie proponas al ni plian ŝtupon. Apud la teksto de la elektita versiklo, li aldonas mallongan komenton por mediti kaj praktiki. Kompreneble, oni povus elekti aliajn versiklojn, proponi aliajn komentojn, eĉ foje malkonsenti kun la aŭtoro. Tamen,



estas tie okazo por mediti kaj plivigliĝi sian fidon.

La proponita titolo de la libro (*Spirita Digesto*) provizas al ni vortludon. La du esperantaj vortoj preskaŭ similaj, “Digesto” kaj “Diĝesto”, indikas al ni kvazaŭ menuon. El la multaj eblecoj kiujn proponas al ni la Biblio, la aŭtoro faris elekton, prenis tion, kion li pensis esenca por nia spirita kresko, kaj tiel konsistigis diĝeston. Sed poste, tion,

kion li elektis kaj komentis al ni, ni devas digesti por nia propra spirita bonfarto. Kiel la profetoj maĉis kaj manĝis la rulaĵojn, ni ankaŭ devas nutri nin per tiu spirita nutraĵo kiu estas la vivanta vorto de Dio, lasita al la homaro por paroli al ni pri Jesuo Kristo.

La libro estas mendebla rete ĉe www.lulu.com/spotlight/spiritualdigest.



Lernantino de Samuel progresas en Esperanto

Profesia psikologo, kiu havis deprimon, vidis la Betesdan laĝeton en sia sonĝo. Li decidis, post movado de akvo, ĵeti sin en la akvon por resaniĝi. Kiam la akvo ekmoviĝis, li volis sin ĵeti en la akvon, sed surprize la anĝelo de Dio haltigis lin kaj diris al li: “Ĉi momente ne estas via tempo por resaniĝo. Eĉ nun vi povas helpi aliajn kvankam vi havas problemojn kaj vi malsanas.”

Tiam la psikologo vekigis. Li estis tre malĝoja. Subite lia telefono sonoris. Viro estis ĉe la telefono, kiu diris al li: “Bonvolu helpi mian filon: li decidis memmortigi sin. Vi estas la sola, kiu povas helpi lin. Li aŭskultas nur vin.” La psikologo, dum liajn okulojn plenigis larmoj, kaptis sian monujon kaj rapidis por savi la knabon.

Ne hezitu, kiam Dio vokas vin. Dio uzas nin por Sia Regno, kvankam ni havas multajn problemojn en nia vivo. Li volas nian veran memon kaj ne nepre nian resaniĝon. Ni estas amataj de Dio.



Mia Ĉiela Patro,
kiel amege Vi brakumas min!
Via brakumo estas la plej sekura loko
en la mondo.

“... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min”

Vesperpreĝo dum la kongreso en Révfülöp

Mária LÁSZLÓ, RO

(Komuna kanto 490)

Nia hodiaŭa vivo estas plena da eventoj. Ni travivas bonajn, malbonajn, streĉajn kaj neatenditajn eventojn. Kian respondon donu al tiu alvoko la kristana homo? La virtulo vivas per sia fideleco. La vera kristana fido estas tiu fido, kiu havas fruktojn. Tia frukto estas inter alie la bonfarado. La homoj praviĝas pere de faroj, kaj ne sole per fido. Pro tio estas la devo, ke ni, kiel kredantoj, ni bonagu! Montras nian kredriĉecon, se ni estas memvole pretaj, el amo, fari bonfarojn. Estas ege grava kiamaniere povas ni venki nian egoismon kaj niajn proprajn interesojn.



Mária László. Fotis Václav Pospíšil

La kristanoj scias, ke ni nenion havas, kion ni ne ricevis de Dio, scias, ke la fido sen faroj estas senfrukta kaj malviva.

Jesuo admonas nin, “donu mangi al malsatulojn, donu trinki al soifanto, gastigu la fremdulojn, amu la alian homon. Laŭ Jesuo Kristo, tiu ĉi amo estas la indulga kaj vera amo kaj estas tiu ama forto, kiu donas esencon al la homa vivo.

Sed kiaj faroj estas la bonaj faroj? La respondo estas: nur tiuj, kiuj fontas el fido, donas konvenan respondon al la Diaj leĝoj kaj okazas je la gloro de Dio.

Jesuo diras: vi gastigis min. Kion signifas tio?

La greka vorto *filoxenia* – signifas amo alla fremdulo – do gastigi signifas, ke vi bonkore akceptis min. En la Biblio en la letero al la Romanoj (15,7) ni legas; “*tiel akceptu unu la alian, kiel ankaŭ Kristo akceptis vin, al la gloro de Dio*”.

La fremdulo estas unu el la plej kompatindaj homoj, kiu ne havas rajtojn, estas senhejma, la vivo estas sen espero kaj malcerta. En la Agoj (20,35) Paŭlo skribas “*vi devas helpi la malfortulojn, kaj memori la vortojn de la Sinjoro Jesuo, kiujn li mem diris: Pli feliĉe estas doni, ol ricevi*”.

En la letero al la Galatoj 6,2 ni trovas la ordonon; “*reciproke subtenadu viajn*

ŝarĝojn, kaj tiamaniere plenumu la leĝon de Kristo”.

Ni devas analizi nian animon kaj nian konduton. Ĉu ni paŝas sur la Dia vojo? Dio volus montri al ni, ke en ĉi tiu mondo regas la malamo kaj la mizero kaj tio ne malaperos, ĝis kiam ni ne al-dio-venos, ne retrovos la super-ĉian regantan aman forton, kaj ni ne komencos ekzerci ĝin. Pro tio, *“pretigu vin en ĉia bonlaboro, por plenumi lian volon, farante tion kio plaĉas al Dio”.*

Je la fino, ni devas demandi: ĉu ekzistas cirkonstancoj, situacioj, kiam la virtulo povas diri “ne”, kiam li ne volas plenumi ordonon kaj ne volas obei al la potenco?

La respondo estas “jes”. La kristano povas kaj devas diri “ne” tiam, kiam la ordono estas kontraŭ la Dia volo, kaj volas deturni, devigi lin kontraŭ Dio. Tamen, ni devas decidi ĉu estas pli bone kontraŭstari maljustecon aŭ estas pli bone trankvile atendi, ke Dio agadu!

Ni aŭdis pri fido de amo. Nun kelkaj vortoj ni diru pri espero. Ni legas en la

libro Malaĥi (3,18–4,2)* kie la Eternulo diras. *“Kaj vi denove vidus la diferencon inter virtulo kaj malvirtulo, inter tiu, kiu servas al Dio, kaj tiu, kiu ne servas al Li. Ĉar jen venos tago, ardanta kiel forno; tiam ĉiuj malhumiluloj kaj malbonaguloj estos kiel pajlo, kaj la venonta tago bruligos ilin ... Sed por vi, kiuj respektas Mian nomon, leviĝos suno de justeco, kaj sanigo estos en ĝiaj radioj, kaj vi eliros kaj saltados, kiel bone nutritaj bovidoj. Kaj vi piedpremos la malpiulojn ...”.*

En la evangelio laŭ Johano (16,33) Jesuo asertas al mi, *“En la mondo vi havos suferadon, sed kuraĝu; mi venkis la mondon”.*

Amen.

(Post la suba preĝo kanto 426)

* Depende de versio de Biblio, la nombrado de versikloj estas malsamaj. En la Biblio de 2006 ne ekzistas 4a ĉapitro, sed tiuj 6 versikloj formas la finon de la 3a ĉapitro.

Kara Patro! Ni dankas vin pro via hodiaŭa prizorgado, pro bela tago. Tiel grava estas por vi nia vivo, ke vi donis al ni vian sanktan filon – Kriston, ke ni ne perdiĝu en ĉi tiu maltrankvila monavara mondo. Pardonu al ni, se ni konscie ne aŭdis vian voĉon pro nia egoisma koro.

Kara Patro, ni petas, vi instruu nin forlasi nian volon kaj obei vian volon, kaj sekvi vian bonan vojon. Helpu nin, ke ni ne laciĝu en bonfaradoj. Ni petas, rememoru ĉiujn manksuferantojn, ĉie en la mondo, ke ni havas senfinan riĉan Patron.

Ni preĝas por bona ripoziga nokto. Restu kun ni ĉiam.

En la nomo de Kristo. Amen.

informejoj

Esperanto ĉe Evangeliaj tagoj en Dortmund

Informbudon organizis Deutsche Esperanto Jugend



Grupo, kiu servis ĉe Esperanto-budo dum la Evangeliaj tagoj en Dortmund en junio.

Paul Würtz raportas:.. Estis por mi la tria fojo je la evangeliaj tagoj, la duan fojon varbante por Esperanto. Ĉiam plaĉas al mi la bunta mikso de homoj tie.

Kun la esperantobudo ni refoje amikece konkuras en la “Markt der Möglichkeiten” pri la atento de la pasantoj. Estas amuza afero, kaj la konversacioj kun la interesiĝantoj estas tre diversaj. Foje vi ekklarigas kio estas Esperanto, foje iome instruas la lingvon aŭ kontraŭstaras antaŭjuĝojn pri Esperanto, kiujn havis la homoj (Ĉu ankoraŭ ekzistas?, La lingvo estas ja fiaskita, ĉu ne? Ĉu ne estas kiel la hispana?)

Fine mi pensas ke ni kaptis multe da atento dum la tri tagoj kaj ĉe kelkaj ja vekis la scivolemon pri Esperanto.



Ni gratulas



Joel Amis


Diocezo de Montrealo
Anglikana Eklezio de Kanado

*Dimanĉon, la 29-an de septembro, 2019, la Feston de Sankta Mikaelo kaj Ĉiuj Anĝeloj, je 4:00 pm. en la Katedralo Christ Church, Ŝia Episkopa Moŝto Mary Irwin-Gibson, Episkopo de Montrealo, intencas ordini Diakonon **Joel Amis** al la sacerdoteco, **Tyson Røserg** kaj **Geert-Jan Boudewijnse** al la transira diakoneco, kaj **Jason Crawford** al la kariera diakoneco.*

Bonvolu subteni la ordinotojn per viaj preĝoj kaj, laŭeble, via ĉeesto.

*Christ Church Cathedral
635 strato Sainte-Catherine O
Montrealo, Kebekio, H3A 2B8, Kanado
Metrostacio: McGill*


Akcepto sekvos en la Halo Fulford.



Ĉu lasos ni ĉe nia tablo

LAISSERONS-NOUS A NOTRE TABLE

Dm A7 Gm Dm A7 Dm




1. Ĉu la-sos ni ĉe ni-a ta-blo i - om da spac' al la frem-dul'?
2. Ĉu la-sos ni en ni-aj vor-toj i - om da temp' al la frem-dul'?
3. Ĉu la-sos ni dum ni-a fes-to pa-ŝon de danc' al la frem-dul'?
4. Ĉu la-sos ni el ni-aj fon-toj ak-von de l' viv' al la frem-dul'?
5. Ĉu la-sos ni en ni-aj kir-koj i - om da lok' al la frem-dul'?

F Gm A Dm Bb Gm A



1.-5. Ĉu al-ve-nin-te tro-vos li i - om da pan' kaj am' ĉe ni?
ko - ron aŭ - di - van in - ter ni?
sin in - vi - ta - ta in - ter ni?
nin en pre - tec' kaj en so - if'?
nin mal - ri - ĉu - loj en spi - rit'?

D Bm Em A7 D




1.-5. Ne la - su ni la te - ron mor - ti. Mor - tu ne - ni - am ni - a flam'.

A D G G#7dim D G F#



Lu - men e - ten - du ni la ma - nojn por la ak - cept' de l' Di - a am',

E7 A7 D A7 D



por la ak - cept' de l' Di - a am'.

LAISSERONS-NOUS A NOTRE TABLE • Alléluia, 46-09 • M: Jo Akepsimas
• franca T: Michel Scouarnec • © Studio SM • Akordoj: Didier Godel 2004,
© FEEPR • E: Roger Degrelle en: Nia kantikaro E161, Philippe Cousson
kaj Albrecht Kronenberger 2019-07-23